



ĈU "NUR" POLITIKO ?

La lingvo, per kiu oni interkompreniĝas tutmonde jam 87 jarojn, estis kreita kun la celo proksimigi la malsamlingvanojn kaj forigi la intergentan malpacon. Tiel pledis Zamenhof mem en 1887.

La iniciatinto de Esperanto konfidis sian verkon al la mastro, kiu plej saĝe povis decidi pri ĝia estonteco, sen riski ke ripetigos la sorto de la aliaj projektoj, kiuj igis nura ŝatokupo de nemultaj lingvoamantoj. Jam Zamenhof komprenis, ke Esperanto estas antaŭ ĉio socia fenomeno, rimedo de la paca rilatado inter la nacioj.

La spertoj de la du mondmilitoj difinis la pacan kunvivadon kiel vivneceson por la homaro. Ĝi ne plu estas abstraktaĵo ŝvebanta en nebulaj pacifismaj deklaroj. Ĝi estis ekposedita de la amasoj, simile kiel la lingvo internacia, ĉar ilin ambaŭ estigis la sama sopiro. Tiu ĉi sopiro manifestiĝas en la 25-jara organizita batalo por la paco.

Kvankam la tempo por la larĝskala apliko de Esperanto ankoraŭ ne estas veninta, tamen la bazaj kondiĉoj por ĝi jam maturiĝas. Lastatempe la eŭropaj nacioj kunsidas ĉe l' ronda tablo, diskutante pri la reciproka kunlaboro. Aliflanke ni spertis, ke en la tutmonda paca forumo en Moskvo kunsidis ankaŭ la esperantistoj, la adeptoj de la pacaj klopodoj, ne la filumenistoj aŭ kolektantoj de poŝtmarkoj! Ĝi atestas la historian optimismon de la movado, nek tro-nek subtaksanta sian ŝancon.

La storma evoluo en la internacia vivo akriĝas pli kaj pli ankaŭ problemon de la nacia sendependeco, paco kaj samtempe tiunde la lingvaj malakordoj. La vivo mem evidentigas, ke ili estas aferoj principe politikaj, ke ili estas solviblaj sole per la politikaj rimedoj.

La plua progresigo de Esperanto estos indiferenta al ĉiuj esperantistoj, kiuj - uzante la lingvon por iuj limigitaj celoj aŭ farante el ĝi nur objekton de sia persona distro - ignoras la alvokon de sia epoko. Se ili anakronisme defendos sian hobiulan, sektecan starpunkton kaj se ili rezignos pri la aktiva partopreno en la socia vivo, kiu estas kondiĉo, neia preteksta ŝildo - por la prospero de la esperantista movado.

/kni/

NEZBYTNOST !

. Za poslední období tohoto roku jsme museli řešit a dořešit mnoho otázek souvisejících s přemístěním svazového sekretariátu, spojených s přípravou plánu činnosti a jeho realizací, i otázky našeho vztahu ke státním či jiným orgánům.

Došlo k výměně funkcionářů v sekretariátu i v některých svazov. orgánech, jednak proto, že tito lidé nesplňovali pracovní podmínky anebo proto, že nemohli či nechtěli pracovat.

Přes všechna tato nutná opatření věříme, že se nám práce bude dařit, že dojde k zlepšení situace i v otázce rozesílání členských známek a legitimací, k lepšímu rozdělení úkolů a jejich důslednému plnění i k uspokojování přání a potřeb našich členů.

Ve své převážné většině členové svazu pochopili naše záměry a kladně je přivítali. To, že například z více než tří čtvrtin již uhradili členské příspěvky, umožnilo, že svaz mohl připravit a objednat další ediční zajímavosti, o nichž se lze dočíst na jiné stránce tohoto čísla. Tím, že naši členové disciplinovaně postupují při zakládání MS, při setkáních, že informují svaz o své činnosti a že se rozcházejí s těmi, kdo spíše škodí než pomáhají, že se aktivizují hlavně na půdě MEM, nám pomohli projednat potřeby a zájmy svazu při jednáních s nadřízenými úřady.

Náš svaz dostal koncem loňského roku příspěvek ze státního rozpočtu, který má být letos ještě větší. Uskutečnil-li se tato dotace včas, zajistíme pro vedoucí funkcionáře našich MS a svazu další internátní školení, zaměřené hlavně na prohloubení spolupráce mezi kroužky a svazem a ostatními celospolečenskými organizacemi i státními orgány. Chceme poskytnout dostatek informací a instrukcí, jak a kterým směrem pracovat v místních skupinách. Chceme se společně poradit o nových formách naší činnosti, neboť všichni cítíme, že tyto dosavadní - ve schůzích, kde se leckdy zabýváme jen svou korespondencí, organizujeme společný kulturní večer anebo se učíme jazyku - nemohou obstát. Dokud se v našich kroužcích nenaučíme pracovat politicky a na základě marx-leninské teorie uplatňovat i potřebu esperanta v naší socialistické společnosti, budeme jen předmětem okrajového zájmu.

Leckdy nám chybí koncepce práce, neznáme ani svá práva, natož povinnosti, jsme stereotypní, mnohdy až konzervativní v metodách propagace a přesvědčování. O tom všem bychom chtěli alespoň v základních rysech hovořit na příštím školení. Mělo by se konat v druhé polovině roku, před sjezdem nebo brzy poté.

Jsme rádi, že důkazem správné cesty a koncepce našeho hnutí, kterou jsme společně nastoupili v dubnu loňského roku v Ostravě, je i příliv nových členů. Nebývají vzácnou výjimkou i tací, kteří se vracejí do našich řad a přitom hradí svůj členský příspěvek za poslední rok nebo dokonce za dva roky. Jsme rádi, že značnou část tvoří mládež, naše budoucnost. Počítáme s ní a budeme s ní řešit i otázku mládežnické sekce, její zapojení do svazu a vytvoření nového vedení této sekce. Proto voláme všechny mladé, a to nejen věkem, ke spolupráci.

Ano, svaz bude moci nabídnout svým členům možnost uplatnění a klidné práce, ale bude vyžadovat i spolupráci, odpovědnost a disciplinovanost. Nemůžeme si dovolit mít řady pasivních členů, pouze platících svůj členský příspěvek! Tím nechci říci, abychom za každou cenu pouze schůzovali. Existence našich skupin by se měla projevit ve spolupráci s národními výbory, na kulturní frontě, v účasti na akcích za světový mír a pod. K tomu není zapotřebí množství lidí. I u nás musí platit: "raději méně, ale kvalitněji".

Říkáme si, že jsme aktivními obránci míru a zastánci dorozumění lidí na celém světě, že toho chceme prakticky dosáhnout právě esperantem. Přesto však sotva 15 procent našich členů odebírá PACO, jediný časopis s mírovou tematikou, jediný opravdu vysoce angažovaný tiskový orgán všech pokrokových esperantistů sdružených kolem MEM.

Tento časopis, nyní tištěný v BLR na křídovém papíře má kvalitní obsah a různorodou tematiku včetně povídek i "dětského koutku" a rozhodně se svou formou vyrovná jiným, o něž je leckdy velký zájem, i když tyto časopisy nemohou svou náplní a pasivitou k světovému dění dát našemu čtenáři něco nového.

Obrácím se proto i na Tebe, příteli či přítelkyně, čtoucí tyto řádky, abyste se zamysleli. Také odběr a četba časopisu PACO je angažovaným přístupem k našim společným zájmům a argumentem při posuzování angažovanosti celého našeho svazu.

Je třeba si uvědomit, že řešení esperantské otázky a našich představ o ní je celým komplexem podmínek a požadavků, které musíme postupně realizovat. Znovu podtrhuji, že pouze angažovanou činností, s jasnou koncepcí v rámci našich možností, která přinese užitek celé naší socialistické společnosti, dokážeme zaujmout místo, které bychom si přáli mít. K tomu je třeba vás všech, poctivých a pokrokových členů našeho svazu, k tomu je třeba získávat další, kteří ještě stojí mimo naši organizaci.

Z.Křimský, tajemník ČES



ZE ZASEDÁNÍ ÚV ČES

Na svém 12.zasedání /27.4./ zhodnotil ústřední výbor svazu práci předsednictva a sekretariátu, za něž podali zprávu J.Vítek a Z.Křimský. Vyslechl zprávu o ekonomické situaci a hospodaření svazu a o stavu jednání s ústředními orgány. Tajemník ČES konstatoval, že k 31.3.1974 bylo vydáno 3550 svazových legitimací.

ÚV vyslechl dále zprávu o některých kulturních akcích pořádaných pod záštitou svazu, o aktivizaci komisí a sekcí. Vytvořením a vedením komise pro koordinaci prací v souvislosti s vypracováním dokumentace esp.hnutí na základě marxismu-leninismu byl pověřen dr.Jermář CSc. O vztazích svazu k UEA referoval ing.F.Sviták. Byl rovněž schválen návrh na složení delegací ČES na sjezd Maďarského esp.svazu /D.Kočvara, I.Kníchal/ a na sjezd AE SSR /dr.Jermář, V.Kočvara, G.Heczko, náhr.Z.Hršel/.

Přítomna byla zástupkyně MK s. Gabrielová.

EL SOFIO

Reprezentantoj de la sep Esp.-Asocioj el Bulgario, ĈSSR, Hungario, GDR, Pollando kaj Sovetunio kunsidis inter la 29a de marto kaj 3a de aprilo 1974 en Sofio. Por ĈES partoprenis ark.J.Drlik, Z.Křimský kaj G.Heczko (junulara repr.) Oni pritraktis la reciprokan kunlaboron kaj la manierojn de la kunordigita agado en la internaciaj renkontigoj kaj la pli efektivan kunlaboron rilate al UEA.

La venontjara konsultigo okazos en Prago.

ALVOKO AL EK. Lokaj grupoj elektu el sia anaro unu peranton por lingvaj demandoj kaj samtempe membron-korespondanton de la Lingva Komisiono. Bv. ne prokrasti la respondon !

PRI KIO PRELEGOS GEOLOGOJ ESPERANTE ?

'Kvankam detala preleg-programo de la varsovia simpozio INTERNACIA LINGVO KAJ GEOLOGIO /ILG. : 6.-10.5.1974/ ankoraŭ ne estas definitive fiksita, tamen oni povas jam nun mencii almenaŭ kelkajn el la deklaritaj temoj.

Al la 1-a sekcio : Kristaliniko, paleozoiko apartenos ekzemple la prelego de E.Lind, CSc./Sovetunio/ pri uzado de magneteco por dismembrigi la enstrudivajn trapojn en norilska regiono. /Trapo estas malhela metamorfa rokaĵo el la facio de granulito/. Doc. d-ro Z.Kowalczewski /Pollando/ prelegos pri geologia strukturo de Sanktakruca montaro. La sama aŭtoro gvidos unutagegan/10.5/ ekskurson tra tiu ĉi interesa pola montaro. En la 1-a sekcio okazos ankaŭ pollingva prelego pri la limo inter verukano kaj verfenio en la centra Slovakio /ĉirkaŭaĵo de Banská Bystrica/. /Verukano estas stratigrafia unuo de permia aĝo; verfenio estas etaĝo de la malsupra triaso/. Notinde estas, ke la prelegonto, ĉeĥo, doc. d-ro V.Náprstek, CSc., reprezentanto de Karola Universitato en Prago, regas la polan lingvon aktive, dum Esperanton provizore nur pasive. Lia referato, kiel ĉiuj aliaj pole prelegotaj, estos resumita en Esperanto. La sama aŭtoro krome sintezos la plej modernajn esplorojn pri la stratigrafia sistematiko.

La 2-a sekcio: Terciario enhavos interalie la prelegon pri paleogeografiaj aspektoj de la hungara eoceno. / Eoceno estas la plej suba etaĝo de la terciara formacio. / La prelegonto, d-ro E. Dudich, ĉeĥo de Informa Servo en Hungara Geologia instituto. D-ro J. Dvořák, CSc., esploristo de Balneologia Instituto, prelegos pri hidrogeologio de l'amaraj akvoj en Ĉeĥoslovakio, prof. E.Ciuk pri glacial-tektonikaj perturboj de kenozoikaj sedimentoj en Pollando. Sekvos ankoraŭ pluaj referatoj.

La 3-a sekcio: Kvaternaro ankaŭ estos riĉa je referatoj. D-ro S.Skompki, esploristo de Geologia Instituto en Varsovio, la ĝenerala sekretario de ILG, prelegos pri sedimentoj kaj formoj de pleistoceno en la centra Pollando. La 6-an de majo okazos unutagega sam-tema ekskurso, gvidata de la ĵusnomita aŭtoro. D-ro J.Nowak prelegos pri karstaj fenomenoj en la orienta Pollando, Mgr.W.Krocza pri disvolvo de geologiaj esploroj en la suda parto de Balta maro, rilate al serĉado de mineralaj krudaĵoj k.t.p.

La tri sekcioj plenumos pure fakgeologiajn programon por specialistoj. Asemblean programon partoprenos ĉiuj simpozianoj, por aŭskulti unue pri la pola geologio, due pri la lingvoproblemo en la geologiaj sciencoj kaj pri la ĝisnunaj atingoj de Esperanto sur tiu ĉi kampo. El la asemblea programo estu menciiita unue la inaŭgura prelego de profesoro R.Osika, la direktoro de Geologia Instituto en Varsovio kaj la honora prezidanto de ILG : "La lastaj atingoj de la pola geologio". Pri la lingvoproblemo paro-



los d-ro V.Zázvorka, CSc., la direktoro de Nacia Muzeo en Prago, la prezidanto de Geologia Sekcio de ISAE kaj la prezidanto de ILG. Gravaj por ILG estos la partopreno kaj komunikajo de s-ro A.Cailleux, la profesoro pri sedimentologio kaj geomorfologio ĉe l'universitatoj Sorbonne kaj Laval, la direktoro de scienc-esploroj ce Centre d'Etudes Nordiques en Québec, la honora prezidanto de GS-ISAE. Prof.Cailleux estas aŭtoro de la seslingva kompendio "Elementoj de Geologio" kaj iniciatinto de pluraj intervenoj plede por Esperanto. Pri Esperanto en la geologiaj sciencoj prelegos la verkinto de ĉi tiuj linioj; li raportos kiel oficiala funkciulo de ILG, nome la ĝenerala sekretario de ISAE, sekretario de GS-ISAE kaj la scienca sekretario de ILG. Pri geologia fakterminaro esperanta raportos d-ro E.Dudich, k.t.

P.

La preparata simpozio estos grava pruvo pri vivanteco de Esperanto en la sciencaj medioj. La reputacion de tiu ĉi internacia renkontiĝo de la geologoj aplikantaj Esperanton alte levas unue la oficialaj subteno kaj aŭspiciado de Geologia Instituto en Varsovio, due amasa partopreno de geologoj neesperantistoj, trie la partopreno de eminentaj geologoj, ĉu esperantistoj, ĉu amikoj de Esperanto.

Josef K a v k a

KUN LATVA VETERANO

En la urba periferio, en la senbrua nepavimita strateto vivas Karlo Kraŭjinŝ. Mi longe hezitis malhelpi la ripozon de la verkisto. Por la 95-jarulo ne ĉiuj vizitoj estas dezirindaj. Je mia ekfrapo eĥis bonhumora "bonvolu eniri".

Konvinkiginte, ke mi estas esperantisto, li ekdeklamis en perfekta Esperanto la studentan himnon "Gaudeamus". Mi rigardis lin kaj jen rememoris pri lia foto, trovebla en ĵurnalo "Zvaigzne" /stelo/. Li staras tie apud rozujo kun rozo sur sia brusto. La poeto nome elektis la pseŭdonimon "Rozamanto" /latve Roĵmilis/.

Estante ankoraŭ lernanto de eklezia lernejo en Velene Karlo hazarde renkontiĝis kun lernolibro de Esperanto. Li ekŝatis la lingvon kaj restis al ĝi fidela ĝis nun. En 1908 en la presejo de la periodaĵo Znanie /scio/ oni oficiale presis Esp.-revuon "Espero". En ĝi oni publikigis ruse kaj esperante etudon de K.Kraŭjinŝ "Fantomo de l'printempo". Kaj ekdè tiu tempo li kontaktis la esperantistojn.

Komence de la jarcento K.Kraŭjinŝ militservis en Peterburgo. Tie li renkontiĝas kun progresema latva inteligentularo samopinianta rilate la internacian lingvon, amikigas kun la latva verkisto kaj revoluciulo Linard Laicens.

Ĝis la jaro 1924 li vivis en Novorosijsk, partoprenadis en kultur-organizaĵoj, laboris kun la lokaj esperantistoj. Samloke liaj vojoj kruciĝas kun tiuj de Fjodor Gladkov kaj Vsevolod Meĥerhold. Pasintjare aperis la libro de Kraŭjinŝ al kiu li donis la titolon "Memorajo el kolektujo". En ĝi li skribas pri siaj renkontiĝoj kun eminentaj sociaj agantoj kaj literaturistoj latvaj fine de la pasinta jarcento, en la periodo de la revolucio 1905 kaj tiu de la Granda Oktobro.

Karolo Karloviĉ senlace popularigadis la sovetian antaŭmilitan beletran literaturon. Li tradukis en la latvan "Ĉapajev" de Furmanov kaj "Cemento" de Gladkov. Siavice la latvaj esperantistoj tradukas en Esperanton la verkojn de Kraujinŝ. En Ĉeĥoslovakio vivanta latvino, laŭ nacieco, M. Jakubcová, esperantigis lian rakonton "Malbena de l' cigano". Esperantistino E. Lippe en Riga tradukas versaĵojn de Kraujinŝ kaj instruisto A. Kubelnieks en Aluksne ektradukis kelkajn liajn verkojn, dum E. Plukša kaj V. Ancitis verkas la monografion pri la latva veterano.

J. Gold en "Sovetskaja molodej" Riga; trad. T. Arbergs

Jubileo sen jubileanto...

Antaŭ dudek jaroj la praga reĝisorino Eva Suchardová-Seemannová kun sia edzo A. Seemann realigis delongan revon de sia letter-amiko J. Baghy, fondinte en Prago teatran kolektivon, al kiu ŝi donis la nomon Verda Ĉaro de Julio Baghy. La fama poeto verkis por ĝi du originalajn teatraĵojn "Granda ludo" kaj "Dum tondras kanonoj".

La ensemblo komencis per diversaj programoj, antaŭ ol transiri al prezentadoj tutvesperaj. Ĝi surscenigis la teatraĵojn "Maryŝa" de fratoj Mrštík, "Pigmaliono" de Shaw /3 foje/, "Nora" de Ibsen, "La patrino" de K. Čapek, "Legendo pri amo". La prezentadon de "Legendo" en 1958 ĉeestis eĉ la aŭtoro mem, Nazim Hikmet, la turka poeto. Li deklaris i. a., ke li aŭdis sian teatraĵon jam en multaj landoj kaj en grandaj teatroj, sed ke li aŭdas ĝin je la unua fojo en Esperanto, kiun li cetere trovas tre muzikeca. Kaj li aldonis: "Tamen nenie mi estis tiel emociita, kiel hodiaŭ inter vi, amatoroj..."

Tri mil spektantoj el 45 landoj ĝuis la surscenigon de "Pigmaliono" ĉe la 44-a UK en Varsovio. Sekvis invito al la 45-a UK en Bruselo, ne plu plenumita.


Neniu antaŭsciis, ke per ripetita prezento de la "Pigmaliono" lo. lo. 1959 en Prago la Verda Ĉaro propre adiaŭas. Sed ĝia laboro ne estas forgesita. Unu el atestaĵoj estu mencio pri la gazeto de la Asocio de vjetnamaj verkistoj, kiu ankoraŭ en 1961 resumis kaj aprezis en speciala artikolo la agadon de tiu ĉi unika ensemblo.

/Resumo el kontribuaĵo por la preparata "Panoramo"/

J. M a ř í k



FELIĈA EDZINIGO. Japanino Tamiko Kaŭakami kaj norvego Asbjørn Nielsen estas internacia paro, kiu estigis per Esperanto. La edzo laboras kiel bibliotekisto en Oslo, la edzino ankoraŭ studas. Ŝi skribis al ni: "Nun mi ĝuas la vivon sen hejmaj laboroj, ĉar li volonte faras ĉion: aĉetadon, kuiradon, lavadon, purigadon, gludadon, kudradon, ordigon ktp."



La plej bona amiko

estas sendube bona libro. Tio ĉi validas ĝenerale, kaj por la esperantistoj speciale. Legado de bonstila verkita Esperantaj libroj alportas al ni veran ĝuon kaj krome eĉ daŭre plialtigas nian lingvonivelon.

En nia respubliko la plej granda biblioteko estas tiu de EK Praha. Ĝi entenas pli ol kvin mil titolojn de beletrio, faka literaturo, lingvoteor. verkoj kaj jarkolektoj de Esperantaj gazetoj el la tuta mondo ekde la komenco de la movado. Ne mankas eĉ tre raraj publikaĵoj el la unua periodo de la movadoj tutmonda kaj nialanda.

Tiu ĉi trezoro estas malfermita por ĉiuj esperantistoj en nia lando. Sufiĉas, ke ili perletere anoncu al ni siajn dezirojn, indikante la titolojn. La libroj estas pruntataj principe por la daŭro maksimume de unu monato. La pruntotkoto estas Kčs 1,- por ĉiu pruntita libro. La prunteprenanto krome pagas Kčs 3,- por ĉiu sendaĵo, por kovri la poŝtelspezojn.

La biblioteko troviĝas en la samaj ejoj, kiel la sekretario de ĈEA (Ĉesky esperantský svaz, knihovna, Jilská 10, PSC 110 00 Praha 1).

Persone ĝi estas vizitebla ĉiumerkrede inter la 18-a kaj 20-a horo k. ĉiun sabato de la 9-a ĝis la 11-a horo.

La biblioteko pretas servi vin, tial senhezite profitu la ŝancon !

(zm)



turistiko libertempo

Konferenco de Monda Turismo (22.-26.7), Bydgoszcz-Inowroclaw-Ciechocinek-Toruń, Pollando

SET Lančov (14.7.-24.7. kaj 28.7.-11.8), ĉe P.Sittauer, Znojemská 1128 ; 674 01 Třebíč

Somera Esperanto-Lernejo en Košická Bebelá apud Košice, ĈSSR (29.7.-10.8.)

Ora Esperanto-Feriado en Pamporovo, Bulgario (14.-24.9.)

Ora Pola Aŭtuno en Miedzygorze, Pollando (5.-18.9.)

La 7-a Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN) en Abaliget, Hungario (15.-24.7)

Internaciaj junularaj Esperantoferioj (27.7.-9.8.) en Wroclaw, Pollando

Somera Esperanto-Lernejo en Dudince, ĈSSR (13.-21.7)

Internaciaj Esp.-Kursoj por instruistoj en Burgas, Bulgario (5.-24.8)



ENKADRE DE LA 25-a DATREVENO de la ĉs.-hungara kunlaboro vizitis la 19an de aprilo la entreprenon Aŭtomatigo de la Fervojoj en Praha-Smíchov k-do Dro Imre P e t h e s , sekretario de la partia organizaĵo ĉe la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj, la konata funkciulo de IFES. La solenaĵon ĉeestis i.a.I. Szentesi , legacia konsilanto de la hungara ambasado. K-do Pethes eluzis la okazon ank-aŭ por renkontiĝi kun iuj esperantistoj en Prago.



KONCIZE EL SLOVAKIO. La 5-a jubilea Kongreso de AE SSR en Martin viciĝas (12.-15.7.) al la solenaĵoj de la 30. datreveno de la Slovaka Nacia Revolucio Limdato por aliĝoj : 31.5.1974 ĉe AE SSR.

La televida kurso de Esperanto komenciĝos en septembro. La tekstaro por ĝi estas havebla ĉe AE SSR.

INFORMACE

z e

SEKRETARIÁTU ČES

PRO VAŠE KNIHOVNY - ČES připravil pro vás v letoš. roce tyto publikace:

LA PERDITA VIZAĜO, sbírka vědecko-fantastických povídek J.Nesvadby s protiváleč. tematikou. Cena do 15 Kčs.


PAŜOJ AL PLENA POSEDO, od W. Aulda. Cvičebnice pro pokroč. Náklad 8 000 výt.cena 19 Kčs

PRI LA VARMO, /dr.J.Tůma, CSc/, náklad 1000 ks, cena od 30 - 40 Kčs. Knížka pojednává o tepelné technice a je důkazem, že lze esperanta využít ve všech oborech. Byla napsána v esperantu a neměla by proto chybět v žádné knihovně.

KOMENIO KAJ LA INTERNACIA LINGVO /separát. čs. čísla časopisu PACO/.

PANORAMO, literární revue ČES, náklad asi 2 000 výt., 60-80 str. 2x ročně. V publikaci se představí známí autoři a překladatelé s novinkami české, slovenské a světové literární tvorby i původní literatury v esperantu.

Dále se připravuje:



CERTECO PRI LA ESTONTO /doc.V.Jiša CSc - V.Kouřil/. Kniha je průřezem čs.dějin posledních 150 let. Jednotlivé kapitoly jsou působivě doplněny znělkami. Vyjde k 30.výročí osvobození ČSSR. Náklad 5 000 ks, cena do 15 Kčs.

HISTORIO DE LA ĈS. ESPERANTO - MOVADO /různí autoři/. Sborník o rozsahu asi 200 stran.

MALLONGE PRI MEM, o vzniku, historii a cílech mírového esperantského hnutí.

Knihy ze zahraničí:



V menším množství jsme objednali některé publikace vydané v NDR a MLR. Jde o "Nuda inter lupoj" od B.Apitze a "Sklavojdedio" od Gardonyiho. Cena knih se bude pohybovat mezi 30 - 40 Kčs. Objednávky přijímáme již nyní.

Z dalších novinek je to knížka anekdot "Ridu per Esperanto", vydaná v Jugoslávii. Cena 18 Kčs. Z Argentiny je to "Friponeto de Tormes" /16 Kčs/. Upozorňujeme, že z každé máme k dispozici jen malý počet výtisků a další objednáme podle vašeho zájmu a potřeby.

Časopisy, které lze objednat u ČES:



Název časopisu /země/	roční předplatné	lze objednat
PACO /BLR/	30,- Kčs	i letos
HEROLDO DE ESPERANTO /Belgie/	80,- "	pouze na r.1975
JUNA AMIKO /MLR/	15,- "	i letos
Der Esperantist /NDR/	12,- "	---
Dia Regno /Holandsko/	35,- "	---
HOMO KAJ KOSMO /SFRJ/	40,- "	---
NORDA PRISMO /Finsko/	není dosud stanoveno/navrhujeme 40,-/	

Dále jsme pro vás připravili :

Dva druhy samolepek k propagačním účelům. Jedna s esper. textem, vychází k 25. výročí světového mírového hnutí a k 20. výročí MEM. Druhá je s českým textem "Esperanto vás spojí s celým světem". Obě budou třibarevné, cena asi 0,20 Kčs za kus. K dostání v červnu až červenci t.r.


Ve stejném termínu má vyjít i černobílá pohlednice s 5 fotografiemi z ČSSR s nápisem "Ĉeĥoslovakio invitas vin" a s esp. hvězdičkou na titulní straně. Cena za ks asi 1,10 Kčs, náklad 3.000 ks. Objednávejte nejméně 10 ks.

Ve stejné době budou k dispozici i obálky a dopisní papír s čs. vlaječkou a esp. hvězdičkou. Symbol bude doplněn textem "Esperanto, lingvo internacia".

Pro velký zájem vydáme letos opět odznaky MEM a nový svazový odznak se státní vlajkou a esp. hvězdičkou. /Grafické návrhy na odznak ČES a samolepky zpracoval D. Bartošík/.

Letos vyjdou celkem již počtvrté Výherní knižní poukázky. Mezi výhrami je např. magnetofon /l.cena/ SET Lančov, Plena Ilustrita Vortaro a některé další publikace. Také letos vyměníme plnou hodnotu VKP, t.j. 10,-Kčs za esper. materiály a knihy. Každé MS zašleme přiměřený počet VKP. Pokud si chcete VKP objednat přímo, zašlete příslušnou částku.

Podarilo se nám dovézt i menší množství gramofonových desek ze SSSR s litevskými písněmi v esperantu /stereo provedení/ za 40,-Kčs. Vyřídíme pouze okamžité objednávky.



Těšíme se na vaše dopisy a prosíme, abyste na všechny složenkách psali vždy jasně účel platby /na titulní stránku nebo do rubriky "Zpráva pro příjemce"/. Ušetříte tím mnoho času na naší straně i zbytečné zdržení. Pokud nemáte naši složenkou, použijte běžnou poštovní poukázku a napište do přísl. rubriky vzáhlaví složenkou nahore : pobočka Praha 2, č. účtu 02-4632-7. Neopísejte nám platby na adresu sekretariátu, jsou s tím admin. problémy! Chceme vám lépe sloužit, avšak potřebujeme od vás více důslednosti !

Všechny mimopražské členy svazu upozorňujeme, že mohou navštívit sekretariát svazu v pondělí až pátek od 7,30 do 15 hod. Potřebujete-li mluvit s tajemníkem ohlašte se několik dní předem, anebo svůj dotaz předejte písemně. Ulice, kde sídlí svaz, navazuje na Malé náměstí poblíž Staroměstské radnice. Telefon svaz dosud nemá.



INTERLIGILO estas gazeto kun interesaj materialoj pri komunikado, radioamatorismo, filatelo, kun rakontoj, sciencaj interesajoj, humoro k.a. Ĝi aperas 6foje jare sur min. 16 pĝ. nur en E-o. Jarkotizo por ĈSSR 15,-Kčs (egalvaloro 1,5 rublo): M. Rybín, Štůrova 26/E, 031 01 L. Mikuláš.

La 12an de marto forpasis la prez. de EK ĉe la Kleriga Societo en Znojmo František Rozsypálek, 58 j., esperantisto ekde 1932.

Berthold Guttmann, IG-ano de Bonex Teplice, forpasis la 10an de aprilo en Dubí.

Honoron al ilia memoro !

Ni legis...

G. MARIN VIZITAS SIAN HEJMON - LA MONDON. Prelego kaj redakto : M. Ĝivoje. Eld. Internacia Kultura Servo, Zagreb 1974, 80 pĝ.

La iniciato de IKS eldonadi la peresperantajn kultur-valorojn estas salutinda. Tamen la leganton de la ĵus recenzita kompilaĵo embarasas ĝia nekohera konsisto, kion kaŭzas parte la nedefinitiva prilaboro far la aŭtoro mem (eroj el la taglibro). La redaktinto uzas en malĝusta tempo kaj sur malĝusta loko la eldiron de A. Einstein pri la neevitebleco de la militoj ("Ni"); en la Karta Enciklopedio erarigas la formoj kiel Angloland, Nordgermanujo, intence aplikitaj de G. Marin. Evitinda estas la formo "verda" (vd. la antaŭparolon). Krome sur la paĝoj oni renkontadas gramatikajn erar(et)ojn.

La verko, restante nur provaĵo en sia speco, apenaŭ estas komparebla kun tiuj de T. Sekelj, kies aŭtoraj kvalitoj alte superas ne nur ceterajn vojaĝpriskribojn en E-o, sed ankaŭ multegajn "literaturaĵojn" kun artisma aspiro. (kni)

INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ. Aperis ĉe UEA jam delonge anoncita naŭlingva komerca vortaro, kiun eldonis la nederlanda firmao Kluwer. Unu el la lingvoj aplikitaj estas Esperanto.

CORVALÁN KAJ ESPERANTO. En la libro Dialogoj kun Luis Corvalán far E. Labarca Goddard, ĉilia ĵurnalisto (la ĉeĥa eldono en 1973), estas ĉi tiu mencio de L. Corvalán pri Esperanto (pĝ. 158): "Foje ni promenadis sur la stratoj de Stalin-grado, hodiaŭ Volgogrado - ĝi okazis en 1960. Ni estis kelkaj latinamerikanoj, jen alpaŝis nin iu sovetia civitano, kiu surhavis strihavan subĉemizan veston, kiel Peĉjo la Maristo. Li scipovis Esperanton kaj aŭdinte nin paroli hispane li alproksimigis ... Kaj kiam li eksciis, ke unu kubano ĉeestas, li diris: "Kamarado, por la kuba revolucio mi oferos eĉ tiun ĉi surhavaĵon..."

ESPERANTO-ELDONISTOJ, kiu emus eldoni porinfanajn fabelojn de la fama sovet. poeto K. Ĉukovskij (ok fabeloj, 1200 versoj) kaj 250 kantojn el 14 lingvoj?

Skribu al la tradukinto R. Grinŝpan, Sovetio 700125, Uzbeka SSR, Taŝkento 125, Vissokovoltnij masiv, ul. Sajfulina 4. Kant-amantoj estas petataj sendi sialandajn kantojn kun muzik - notoj. Nepre registru viajn leterojn!

GAZETARA SPEGLIO. "Vivanta Esperanto" titoliĝas la artikolo aperinta la 19an de apr. en Zemědělské noviny (agrikulturista gazeto, 350 mil ekz.) pri la Esp.-movado en la socialismaj landoj • Gazeto Mír (Paco) 2/74 eldonata de Ĉeĥo-slovaka Paĉkomitato aperigis la tekston de la Komuna Deklaro de Tutmonda Paĉkonsilantaro kaj Mondpaca Esperantista Movado (MEM) • En "Prŭboj", organo de la regiona KP-Komitato en Ustí n/L. ekaperis la 20an de apr. semajna Esperanto-rubriko.

A. Bárčohová 80 - jara.

Ĉiam vigla kaj nelacigebla kasistino de EK Praha, honora membrino de ĈEA, portantino de la Honor-Insigno de MEM, Anna Bárčohová, ĝisvivas la 23an de majo sian 80an naskiĝ-datrevenon. Esperantistino depost 1921, ŝi daŭre laboras por la praga klubo, lastatempe zorgante ankaŭ pri la ekspedado de ĝia bulteno. S-ino Bárčohová plenumas siajn taskojn kun enviinda verve, maladekvata al ŝia aĝo kaj imitinda eĉ de la pli junaj kunmembroj. (k)

Rondeta vivo



AŠ - La bulteno "Kompas", eldonata de la INTERKLUBO ĉe ZK SSM Tosta (pk. 32; 352 11 Aš 1, distr. Cheb), informas pri la agado de la Klubo instalitanur antaŭ pli ol unu jaro. Ĝi celas internaciecan edukon en la ĉelima regiono forte influata de la okcidentaj amaskomunikiloj. Inter la 7 sekcioj, el kiuj la plej grava estas tiu de Sovetio, estas ankaŭ la Esperanta sekcio, samtempe loka grupo de ĈEA. Ĝia tasko estas lernigi Esperanton kaj apliki ĝin en la kontaktoj kun la landoj, kie la interkompreniĝo helpe de la rusa lingvo ne eblas (ekz. en Kubo, VDR, Hindujo, arabaj landoj kaj sim.) En ĉiuj aktivecoj de la Interklubo (krom unu dumjara ekskurso eksterlanden) rajtas partopreni ankaŭ la ceteraj interesitoj.

HORICE - la 12an de februaro oni elektis novan komitaton - kun la prez. F. Patera, sekr. ing. S. Kareš, kasiso B. Munzar kaj kult. ref. K. Krejčík - por aktivigi la rondetan vivon. Kiel aktivulo por la kunlaboro kun la loka Packonsilantaro funkcias ing. Kareš. La Uzina Klubo promesis financon helpon 1000 Kčs.

JABLONEC n/N. - Sub la slogano "Kilometroj por la paco k. amik-eco" la EK ĉe KASS okazigis la 27an de aprilo la IIan Internacian Esp. Rondmarŝon ĉirkaŭ la urbo. Antaŭ la starto ĉiuj partoprenantoj ricevis detalan vojpriskribon kaj speciala insignon. Porokazajn diplomojn eldonis EK kunlabore kun la Distrikta Packonsilantaro.

YJOV - Jarkunveno de LG la 6. de marto pritraktis la financon planon aprobitan de la uzina klubo kaj la laborplanon por 1974. Ĝi antaŭvidas vastigon de la membra bazo helpe de kursoj kaj aplikante E-on en la porpaca agado, kunlabore kun la kluboj en kaj eksterlandaj. Popularigi E-on oni intencas ankaŭ inter la junpioniroj.

OPAVA - Omaĝe a la 750a datreveno de la fondiĝo de la urbo okazos en Opava la III-a Esperantista Kultur-Festivalo (5.-8.7.1974) kun eksterlanda partopreno.

PARDUBICE - EK ĉe la Kulturdomo ROH DUKLA aranĝas la IV. an amikan renkontiĝon sur la Kunětická-monto apud Pardubice (25.-26.5.1974).

PRAHA - La jarkunveno de LG okazis la 22an de apr. Oni elektis la novan komitaton kun la prez. J. Drlík kaj kun la vicprezidantoj d-ro M. Nývlt, J. Mařík kaj D. Bartošík. Reprezentanto de MEM estos d-ro R. Horský.

PRÍBRAM - En la lastaj monatoj la klubo koncentriĝis al programoj kun lingvoperfektiga enhavo. La kluban vivon riĉigis per siaj programoj vizitantoj el aliaj lokoj (L. Křivánek el Písek pri la sudbohemia or-rivero). La tria vizito ĉijara de E. Seemannová estis dediĉita al Verda Ĉaro de J. Baghy.


Daŭra subteno de la uzina klubo "Uranové doly" ebligas ankaŭ pli oftan aperigadon de favoraj informoj en la loka kaj distrikta gazetoj. Oni bone kunlaboras ankaŭ kun la Klubo de invalida junularo, kie okazas kurso por komencantoj.

SUMPERK - LG intencas gajni en 1974 pli da kotizantaj anoj por la As. kaj stimuli la movadon de Amikoj de E. kaj aranĝi kursojn por la junpioniroj. Krom tio regule popularigi E-on kunlaborante i.a. kun la distrikta gazeto Naše Slovo....

NI DENOVE ATENTIGAS lokajn grupojn kaj ĉiujn kunlaborantojn de STARTO, ke ili verku siajn artikolojn (klubajn k. lokajn informojn) en Esperanto!

Esperanto - rondetoj, aperigante la informojn pri E-o en viaj uzinaĵoj a ŭ distriktaj gazetoj nepre sendu la pruv-ekzemplerojn al ĈEA !!!

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16



K r u c e n i g m o de J. Cink.

HORIZONTALA : A/ Part' de Sovetunio; kapablec por iu posteno; disvastig' de malicaĵoj.- B/ Malokupitec'; ovoforma figur'; nedifinita aĵo; prezent' de bildoj en menso; ŝatege.- C/ Homa internaj'; ĉirkaŭ-ekstrem- aĵa; sensperte kredema; fil' de frato.- D/ Rapidega akvo-flu'; plejparte element' en aero; forte mantreni. E/ Mallongigo de la Universala Kongreso; vertikale grandmezura; dolĉaj'; pasinteco; artikolo en Esp.-o E/ Papilieto; klopodeg'; part' de cirklo; instrument' por senbarbigo.-

G/ Membrig'; kortbirdo; subskribo surambio; párola.- H/ Kemia elemento n-ro 53; postlas'; forta dezir'; virseksa infan'.- I/ Sengiba kamel'; senrezult'; kemia signo de teluro; refleksivo; atmosfer'; posteulo.- J/ Part' de organismo; orela membran'; fask' da trunketoj.- K/ Egipta sun-dio; buŝe esprimigi; ĉe-fiksi; kemia signo de la nobelio.- L/ Antikva greka monereto; temp' de 365 tagoj; fresiga trinkaĵo; interjekcio de forta rompado!

VERTIKALA : 1/ Unua parto de la sekretaĵo (proverbo laŭ Zamenhof).- 2/ Organizaĵo; film-projekcio; logant' de nordafrikaj ŝtatoj.- 3/ Centr' de nia planedaro; eta amfibi'; kemia signo de la magnezio; porcia prepozicio.- 4/ Nedifinita objekto; denova liter-perceptad'; farita el kokin-produkto; dativa prepozicio.- 5/ Nombrebila eco; il' por fermi kaj malfermi akvokondukilon; 21-a litero de E-o alfabeto.- 6/ Bagatela; valor-unuoj ĉe ludo.- 7/ Virine malaltvoĉa; teksaĵa.- 8/ Apartenanta al li; la lasta litero de la E-o alfabeto; rimarkig'; araba potencul';- 9/ Malnov-grek'; valora metal'; jara; ofta mineral'.- 10/ Itala aŭto-marko; simple;- 11/ Ripeti laŭ iu aŭ io; eliganto de laŭtega voĉo;- 12/ Frandaĵ' el sturga fraĵo; malgranda lirika poemet'; komenciga prefikso.- 13/ Mallongigo de pezunuo; provizad' per bataliloj; laŭta voĉ'; mallongigo de la norvega radio-asocio.- 14/ Ŝafa harar'; organika ruĝa farb'; sukfilso por aktiveco; nedifinita.- 15/ Granda simpati'; temanta antikvan muzikilon; esprim' de ŝulda sento.- 16/ Dua parto de la sekretaĵo.

Helpilo : G/ Ĝiro; L/ Obolo; 3/ Emir'; 9/ Ion'; spat'. 12/ Kaviar'; 14/ Eozin'.

*Korespondi
deziras*

FRANCIO - s-ino F. CRÉPEL, 23jara instruistino, 16a b/d A. Carrol, 35 000 Rennes;

SVEDIO - s-ro Jan VEDEVİK, 53j. kun esperantistinoj ankaŭ pri lit.kaj arto, poste restante Götteberg 1;

HUNGARIO - Klára BANC, instruistino, H 1102 Budapest X, Zalka Maté tér. 2.f.5; f-ino Z. BENDLI H-9024 Győr, Hunyadi u. 3/b; s-ro G. SZALKAI, 21jara, Sibrik H. út. 14, H-3529 Miskolc; L. BU-RUNCZ, 23j. Bocskai 2/c, 2440 Dunajváros; f-ino S. TÓTH 17j., Sámsoni ut. 31, 4028 Debrecen.

HISPANIO - 46-gekmaboj kun tuta mondo. Skribu al instruisto: R. Canet, str. Quintana 12-30 Alicante.

KOLUMBIO - J. VASQUEZ, Calle 48AN 4850 Itagui;

S T A R T O - eldonas ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Aĵeras okfoje jare. Respondeĉa redaktoro O. Kníchal. Red. rondo: ing. F. Svíták, J. Mařík, ing. E. Felix.- Dohledací pošta Praha 07, sniĝpošt. poplatek povolen RP Praha j.z. P/1-2283/1971. Toto ĉíslo bylo předáno tiskárně 24. května 1974.